

# LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la  
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato  
Jarkolekto 3, n-ro 4 (16): novembro-decembro 2010

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,  
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: [pieter-jan.doumen@telenet.be](mailto:pieter-jan.doumen@telenet.be)

---

## Redaktore...

*Karaj Gelegantoj,*

*Jam pasis la plej agrabla periodo de la jaro: suno, ferioj, longaj tagoj... Kaj rekomenciĝas la periodo de la longaj vesperoj kaj noktoj, de nebulo kaj malvarmo, kiuj instigas la homojn restadi en la varma hejmo kaj stimulas al televidado, societaj ludoj kaj legado. Tio donas al ni la okazon legi Esperantlingvan romanon, ekzemple de Trevor Steele aŭ de Anna Löwenstein, kies libroj, originale verkitaj en Esperanto, estas pli ol legindaj... Sed ankaŭ multaj libroj tradukitaj el diversaj naciaj lingvoj atendas legantojn. Ĝuste tiu speco de legaĵo ebligas vin konatiĝi kun aliaj kulturoj en la mondo. Se vi deziras konatiĝi kun aliaj popoloj, legu iliajn plej grandajn verkojn, en kiuj oni trovas ilian karakteron, proprajn tradiciojn kaj kvalitojn kaj lernu respekti kaj ŝati ilin. "Nekonata estas neamata" diras nederlanda proverbo. Tiel legado kontribuas ankaŭ al la paco en la mondo.*

*Legado ankaŭ estas necesega, se oni volas bone mastri lingvon kaj familiariĝi kun ĝi. Per legado la propra esprimmaniero de la lingvo aŭtomate fiksiĝas en nia memoro. Tio ne nur validas por la propra nacia lingvo, sed ankaŭ, kaj ankoraŭ pli, por fremda lingvo, kio estas ankaŭ Esperanto. Ne estas eble bone lerni ĝin sen multa legado.*

*Intertempe mi rekomendas al via malsata menso tiun ĉi numeron de "La Ponto", kiu volas krei almenaŭ ponteton inter la homoj. Agrablan legadon!*

*Pieter Jan Doumen*

## Antaŭparolo de la Unua Libro (2) (Voorwoord van het Eerste Boek) (2)

La problemo de internacia lingo longe okupis min; sed ĉar mi sentis min nek pli kapabla nek pli energia ol la aŭtoroj de tiuj ĉiuj senfruktaj malsukcesintaj provoj, mi longe limigis min nur al revado kaj senvola pensado pri la afero.

Kaj kelkaj bonaj ideoj, kiuj estis la fruktoj de tiu nevola pripensado, kuraĝigis min plu labori pri ĝi kaj konvinkis min provi, ĉu mi povos sukcese venki ĉiujn malhelpojn ĉe la kreado kaj utiligado de racia internacia lingvo. Ŝajnas al mi, ke mi sukcesis pli-malpli, kaj tiun rezultaton de mia longdaŭra, senĉesa laboro mi nun prezentas al la kritiko de la leganta publiko.

I. La lingvo devas esti eksterordinare facila, tiel ke ĉiu povas lerni ĝin.

II. Ĉiu kiu lernis la lingvon, devas povi tuj uzi ĝin ĉe interparolado kun homoj de diversaj nacioj, sendepende de tio ĉu la lingvo estus agnoskita de la mondo kaj trovus multajn adeptojn aŭ ne, t.e. ke la lingvo devas povi servi, ekde de la komenco kaj danke al ĝia propra strukturo, kiel vera komunikilo en internaciaj rilatoj.

III. Rimedoj devas esti trovitaj por venki la indiferenteco de la granda publiko kaj kuraĝigi ĝin amase uzi la proponatan lingvon kiel vivan lingvon, kaj kun la ŝlosilo en la mano en kazo de ekstrema bezono.




El ĉiuj projektoj prezentitaj al la publiko en diversaj tempoj, ofte kun la brua, per nenio pravigita nomo 'mondlingvo', neniu plenumis pli ol unu el al ĉi-supraj taskoj, kaj tiun ankoraŭ nur parte.

La unuan taskon mi plenumis jene:

a) Mi simpligis la gramatikon en neverŝajna maniero en la spirito de la ekzistantaj lingvoj, por ke ĝi povu esti facile asimilata sen pro tio senigi la lingvon de klareco, precizeco kaj supleco. *La tutan gramatikon de mia lingvo oni povas facile lerni en unu horo.*

b) Mi kreis regulojn por la vortfarado kaj tiel enorme limigis la kvanton de la lernendaj vortoj, sen per tio senigi la lingvon de ĝia riĉeco,



sed kontraŭe, danke al la ebleco fari el unu vorto multajn aliajn kaj povi esprimi ĉiujn eblajn nuancojn de nocioj, fari ĝin pli riĉa ol la plej riĉa viva lingvo. Tion mi atingis enkondukte diversajn prefiksojn kaj sufiksojn. Por pli da komforto, mi donis al tiuj prefiksoj kaj sufiksoj la signifon de substantivoj kaj metis ilin tiajn en la vortlisto. Ekzemple:

La prefikso *mal* indikas kontraŭan nocion; se sekve oni konas la vorton 'bona', oni povas mem formi la vorton *malbona*, kaj aparta vorto por la nocio 'malbona' estas *superflua*; *alta* – *malalta*; *estimi* – *malestimi* ktp. Sekve lernante la vorteton *mal* ni estas liberigitaj de la neceso lerni tutan serion da vortoj: *malmola*, *malvarma*, *maljuna*, *malpura*, *malproksima*, *malriĉa*, *mallumo*, *malhonoro*, *malsupre*, *malamo*, *malbeni* ktp.

La sufikso *in* indikas la virinan sekson; se oni sekve konas la vorton 'frato', oni povas mem formi la vorton *fratino*; *patro* – *patrino*. Sekve specialaj vortoj por *avino*, *filino*, *fianĉino*, *knabino*, *kokino* ktp. estas *superflujaj*.

La sufikso *il* formas instrumenton por donita aktiveco. Ekz. *tranĉi* – *tranĉilo*; aliaj vortoj por *kombilo*, *hakilo*, *sonorilo*, *plugilo*, *glitiloj* ktp. estas *superflujaj*.

Kaj tiel ekzistas ĉirkaŭ kvindek da ili.

Krome mi difinis per ĝenerala regulo, ke ĉiuj vortoj, kiuj sukcesis fariĝi internaciaj (la tiel nomataj fremdaj vortoj) estas transprenataj senŝanĝe en la Internacian Lingvon, kondiĉe ke ilia ortografio estas adaptita al tiu lingvo. Tiamaniere la lernado de granda kvanto da vortoj fariĝas *superflua*. Tiaj vortoj estas ekz. *lokomotivo*, *redakcio*, *telegrafo*, *nervo*, *temperaturo*, *centro*, *formo*, *publiko*, *platino*, *botaniko*, *figuro*, *vagono*, *komedio*, *eksploati*, *deklami*, *advokato*, *doktoro*, *teatro* ktp.

Danke al iuj reguloj kaj ankaŭ al iuj kvalitoj de la lingvo, pri kiuj mi ne deziras detale paroli, la lingvo fariĝas eksterordinare facila, kaj la tuta studolaboro de la lingvo estas reduktita al 900 vortoj (inter kiuj ĉiuj gramatikaj finaĵoj, prefiksoj kaj sufiksoj), danke al kiuj estas eble, per la apliko de iuj reguloj, formi ĉiujn vortojn, esprimojn kaj parolturnojn bezonatajn en la ĉiutaga vivo, sen speciala kapableco aŭ penado de la menso. Cetere, kiel oni povas vidi, la 900 vortoj estas tiel elektitaj, ke ilia lernado fariĝas ege facila por malpli instruita persono. La lernado de tiu ĉi sonora, riĉa kaj por ĉiu komprenebla lingvo tiumaniere postulas ne serion da jaroj kiel por la aliaj lingvoj, sed kelkajn tagojn.

D-ro L.L. Zamenhof (Daŭrigota)

## Neologismoj: pro aŭ kontraŭ


(*Neologismen: voor of tegen*)

Artikolo de Anna Löwenstein en la revuo "Esperanto", n-ro 1233, provokis multajn reagojn pro kaj kontraŭ. La multe laŭdata verkistino de (ĝis nun) du originalaj romanoj, "La Ŝtona Urbo" kaj "Morto de Artisto", asertas, ke poetoj fuŝas la lingvon, uzante neologismojn.

Sed kion diris Zamenhof pri novaj vortoj? En la "Aldono al la Dua Libro de la Lingvo Internacia" (1888) li skribis: "La vortaro, kiu estis aldonita al mia unua broŝuro, estas neplena. Sed mi ne havis la intencon kiel aŭtoro eldoni plenan vortaron kaj krei la tutan lingvon de la kapo ĝis la piedoj. Ĉar unue, la kreado de tute plena vortaro estas neebla por unu homo, tial ke la nombro de la vortoj en lingvo estas senfina. Unu homo tie povas esti nur iniciatoro, sed ne kreanto. Tutmonda lingvo devas esti pretigata paŝon post paŝo per la kunigita laboro de la tuta civilizita mondo.

"Se ia vorto ne estas trovita en la vortaro, kiun mi eldonis, kaj oni mem ne povas fari ĝin laŭ la reguloj de la internacia vortfarado, nek anstataŭigi per alia esprimo, tiam ĉiu povas krei tiun vorton laŭ lia persona plaĉo. Ĉiu vorto, ĉiu formo, kiu ne estas rekte kontraŭ la jam kreita gramatiko kaj vortaro, aŭ kontraŭ la logiko aŭ la leĝoj enkondukitaj de la plimulto de la uzantoj, estas tute bone, tute egale ĉu ĝi plaĉos al mi persone aŭ ne.

"Per unu vorto, la lingvo internacia devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiuj progresas ĉiuj vivaj lingvoj, kaj tiu formo, kiun mi donis al ĝi, tiu gramatiko kaj tiu vortaro, kiujn mi prezentis, devas esti sole la fun-



damento, sur kiu estos ellaborata la efektiva Lingvo Internacia de la estonteco.

“Nur tiuj vortoj, kiuj ne estas trovataj en la fundamenta vortaro, estos malegale kreataj de malsamaj aŭtoroj en la unua tempo. Sed ĉar, unue, tiaj vortoj estas nur dise renkontataj inter la multo da vortoj jam konstantaj, kaj ĉar, due, la nombro de tiaj malegale sonantaj vortoj ankoraŭ pli malgrandiĝos danke al la komuna fonto, el kiu la aŭtoroj prenados la novajn vortojn, prezentos nenion alian ol ‘provincialismojn’ de la Lingvo Internacia. Tiaj provincialismoj ekzistas en ĉia alia lingvo. La malfeliĉe kreitaj vortoj baldaŭ perdiĝos, kaj la feliĉe kreitaj vortoj restos kaj eniros en la lingvon; la vortoj kiuj estas egale feliĉe kreitaj, sed malegale sonas, batalos inter si kelkan tempon kiel sinonimoj, sed jam post mallonga tempo ni vidos, ke unu el tiuj formoj estas uzata pli ofte ol ĉiuj aliaj formoj, kaj baldaŭ la unua formo elpuŝos ĉiujn ceterajn formojn.

“Tiuj kiuj volas labori super la Lingvo Internacia, skribi verkojn en tiu lingvo ktp., povas nun krei ĉian ankoraŭ nekreitan vorton laŭ sia plaĉo. Se vi volas skribi al iu en la Lingvo Internacia kaj vi devas mem krei kelkan novan vorton, sed vi volas havi la certecon, ke la adresito tute bone komprenos la vorton, vi povas meti apud la nove kreita vorto la tradukon de tiu ĉi en ia alia lingvo, en kiu tiu vorto ekzistas”.

Se Zamenhof retiriĝis sin kiel aŭtoro de la lingvo kaj transdonis ĝin al la esperantistaro por ĝia plua disvolviĝo, tio ne estis pro modesteco – modesta li certe estis – sed pro tio, ke li en sia saĝeco juĝis tion la solan ĝustan vojon, kiun la esperantistoj devas sekvi.

Esperanto devas do evolui kiel ĉiu natura lingvo, kaj se la esperantistoj volas kun li, ke ĝi efektive fariĝu tutmonda lingvo, ĝi devas ankoraŭ pli evolui kaj riĉiĝi por esti kapabla esprimi ĉion ajn ekzistantan en la mondo. Kaj laŭ mia opinio, tiun stadion, ĝi ankoraŭ tute ne atingis. Esti kontraŭ neologismoj, estas sen-senca, ĉar unuflanke tiu evoluo estas necesa, kaj aliaflanke oni ne povas bremsi la evoluon de lingvo.

La sama okazis en la latina, kiu komence estis nur dialekto de kelkaj mizeraj vilaĝoj en la mezitala Latio, sed necese devis evoluigi al mondlingvo por povi plenumi sian rolon de lingvo de la administracio kaj leĝodonado de la Romia mondimperio kaj poste de la mond vasta katolika religio. Tamen la gramatiko de la lingvo preskaŭ ne ŝanĝiĝis ĝis nun. Tio servu kiel ekzemplo al Esperanto.

Tio tamen ne devas malhelpi verkistojn verki en la fundamenta lingvo, kiu estas vere bela kaj admirinda. *(Pieter Jan Doumen)*

## **Nia bunta vasta mondo**

*(Onze bonte wijde wereld)*

**Kial mamnutrataj beboj estas pli sanaj?**

*(Waarom zijn zogende baby's gezonder?)*

Esploristoj malkovris la molekulon, kiu respondecas pro tio, ke mamnutrataj baboj estas pli rezistaj kontraŭ intestaj infektoj.



Patrino, kiu mamnutras sian bebon, travivas gravajn ŝanĝojn en sia korpo, kiuj zorgas, ke ŝia mamnutrata bebo ricevu antikorpetojn. Ĉe virinoj, kiuj donas boteletojn, tiuj antikorpetoj

circuladas en ŝia sangvojo kaj regule direktiĝas al la intestoj, kiuj pretas protekti ŝin kontraŭ intestaj infektoj. Kontraŭe ĉe mamnutrantaj patrinoj iuj el tiuj ĉeloj direktiĝas al la mamglandoj. De tie la antikorpetoj iras kun la patrina lakto rekte al la intestoj de la mamnutrata bebo, kie ili protektas ĝin kontraŭ infektoj, dum samtempe la imunsistemo de la bebo plene disvolviĝas. Tio estas ankaŭ la kaŭzo, kial antaŭaj studoj konstatis, ke diareo duoble pli ofte aperas ĉe beboj, kiuj ricevas botelnutradon, ol ĉe infanoj, kiuj trinkas patrinan lakton.

Sciencistoj identigis en musoj la molekulon, kiu klarigas tion al la blankaj sangoĉeloj. La malkovro de tiu molekulo verŝajne povos estontece zorgi, ke beboj estu ankoraŭ pli bone protektataj. Esploristoj pensas pri la disvolvo de vakseno por patrinoj, kiu zorgas, ke la transporto de antikorpetoj al la infano okazu kiel eble plej efike.

*(Journal of Immunology)*

### **La mondoloĝantaro: iom da matematiko**

*(De wereldbevolking: 'n beetje wiskunde)*

Kiam la inventisto de la ŝakludo prezentis sian inventaĵon al la reĝo, li petis tiun ĉi doni al li kiel rekompenco unu grenon da rizo, kiun la reĝo devis duobligi por ĉiu ĉelo de la ŝaktabulo. La reĝo kredis, ke la rezultato estos nur kelkaj sakoj da rizo, sed li grave eraris. Kial? La kvanton de la rizo oni kalkulis jene: 1, 2, 4, 8, 16, 32, 64, 128, 256, 512, 1024, 2048, 4096, ktp. En la 20-a ĉelo oni havis jam 524.000 grenojn, en la 30-a jam 537.000.000. La kvanto da rizgreno en la lasta ĉelo estis vere astronomia nombro: proksimume 10 en la 19-a potenco (1 sekvata de 19 nuloj)! Tio estas dek miliardoj multiplikita per unu miliardo! Tamen ŝaktabulo havas nur 64 ĉelojn.

Sub kreskoproporcio de ekz. landa loĝantaro oni komprenas la kreskon, kiu estas la sekvo de la naskiĝoj minus la forpasoj. Kiam la loĝantaro de vilaĝeto kreskas de 300 al 600 loĝantoj aŭ tiu de lando kreskas de 3 milionoj al 6 milionoj dum la sama periodo, en ambaŭ kazoj la kreskoproporcio estas la sama. Sammaniere 6 miliardoj da homoj povas kreski al 12 miliardoj dum la sama periodo. Tiel oni komprenas, kial la mondoloĝantaro kreskas tiel rapide nuntempe. Oni prave diras, ke trologateĉo minacas la teron.

La nuna kreskoproporcio en certaj landoj de Afriko kaj Sud-Ameriko estas pli ol 3% jare. En pluraj okcidenteŭropaj landaj ĝi estas mal-

pli ol 0,5%. La mezuma tutmonda kreskoproporcio estas nun 1,7 % jare.

La evoluistoj asertas, ke la moderna homo estiĝis antaŭ ĉirkaŭ unu miliono da jaroj. Tial 6 miliardoj nuntempe estas ekstreme malmultaj.

Matematikistoj faris jenan kalkulon. Se ni supozus, ke la kreskoproporcio dum tiu miliono da jaroj estis nur 0,01% jare, la mondoloĝantaro duobligiĝis nur post ĉiu periodo de 7000 jaroj: do 4 post 7000 jaroj, 8 post 14000 jaroj ktp. Oni devus duobligi 143 fojojn la komencan nombron. Tiu kalkulo donus nun la nombron de 10 en la 43-a potenco (1 sekvata de 43 nuloj! Neprononcebla nombro!

Se oni donus 1 m<sup>2</sup> da seka tero al ĉiu el tiuj terloĝantoj, oni povis nur loki 10 en la 28-a potenco da ili, nombro kiu estas nur unu biliardo de la tuta nombro! Sed ni tamen estas 'nur' 6 miliardoj. *(Revue Science et Foi)*

### **Malpaco en reĝa haremo**

*(Ruzie in koninklijke harem)*

Reĝo Msvati III de Svazilando havas zorgojn. Reĝo kun multaj edzinoj estas tute normala afero laŭ la multjarcenta svazilanda tradicio. La patro de Msvati, reĝo Sobhuza II, havis pli ol sepdek da ili. La 42-jara Msvati mem ankaŭ ne malŝatas virinan belecon. Inter la junaj svazilandaj knabinoj, kiuj montras sian duonnudan korpon dum la ĉiujara kanjupdanco por plezurigi lin, li ĉiam scias trovi novan edzinon.



Tiel ankaŭ ĉi-jare, post kiam finis la danco, Zena Malangu estis kunprenita de servistoj de la reĝo al la reĝa gastejo por fariĝi unu el la ‘patrinoj de la nacio’.

Sed la patrino de Zena, Lindive Dlamini postulas, ke ŝia filino estu redonita al ŝi. “Ŝi estis kidnapita, kaj la reĝo ne havas tiun rajton”, diris la virino, kiu ricevis multe da apogo kaj simpatio por sia lukto kontraŭ Msvati, precipe el la najbarlando Sud-Afriko. Ŝi ne atendas ricevi honestan proceson en sia propra lando kaj tial minacas turni sin al la internacia tribunalo en Hago.

Ne nur tiu ebla nova edzino faras zorgojn al la aŭtokrata reĝo. Reĝino Notando Dube kaŭzis internacian skandalon, kiam ŝi, dum foresto de Msvati el la lando, estis trovita inter la brakoj de la ministro pri Justico. La reĝino ricevis devigan hejmrastadon, kaj la ministro troviĝas en malliberejo, atendante la revenon de la reĝo el la eksterlando. (H.B.V.L.)



### **Glacimumio Ötzi ne havas parencojn** (*Ijsmummie Ötzi heeft geen familie*)

La 5.300-jara glacimumio Ötzi denove cedis unu el siaj sekretoj. Italaj sciencistoj povis kunmeti lian kompletan mitohondrian DNA. Tiu relative malgranda genomo estas plene transdonata de patrino al infano, kaj povas do esti redukita al prapatrino. La genomo estas ankaŭ la plej malnova kompleta peco da DNA de homo sapiens, kiu povis esti malĉifrita. La rezultatoj korektas ekzamenon de 1994, kiu asertas, ke en Eŭropo hodiaŭ estas ankoraŭ malproksimaj parencoj de Ötzi. La glacimumio apartenas al la grupo K1, al kiu apartenas granda parto de la modernaj eŭropanoj. Sed tiuj ĉi apartenas al unu el la tri konataj branĉoj de K1, dum la DNA de Ötzi ne apartenas al unu el la tri grupoj, sed al iu ĝis nun nekonata subgrupo. Ŝajnas do, ke la subgrupo al kiu apartenas Ötzi, formortis post li.

(Franco Rollo, *Universitato de Camerino, Italio*)

### **Funebra domo gardata dum enterigo** (*Rouwhuis bewaakt tijdens begrafenis*)

Ĉiam pli da funebrantaj familioj luas privatajn gardistojn por preventi, ke dum enterigo-ceremonio ŝtelistoj penetru en ilian domon. Ankoraŭ pasintsemajne viro estis kaptita ĉe la freŝa faro en domo en Schoten (Antverpeno). Per mortanonco en gazeto li eksciis, ke bona-hava persono estos enterigita la saman tagon. Ĉar ankaŭ la funebra adreso estis menciita, li povis senprobleme trovi riĉan rabaĵon, sed la polico preventis la ŝtelon.



“Ĉiam pli ofte ni estas petataj gardi la domon de funebranta familio por preventi ŝtelon,” diras A. D’Haese, direktoro de gardofirmao. “En Antverpeno ni intervenas almenaŭ unufoje semajne. Unu tia interveno kostas € 150. Plej ofte temas pri riĉaj familioj, kiuj dungas nin. Ni laboras en du manieroj: aŭ nia agento restadas en la domo aŭ li aŭ ŝi patrolas ekstere, bone videbla. Ni zorgas, ke estu moviĝo en aŭ ĉirkaŭ la domo, kio fortimigas ŝtelistojn. Tiel ni preventas, ke familioj, kiuj jam travivas malĝojigan periodon, havu ankoraŭ pli da mizero.” (H.B.V.L.)

### **Novajoj el Esperantolando**

**Italio:** *Nova bildrakonto en Esperanto* –

Post la sukcesoj de ‘Ratman’ kaj ‘Diabolik’, la projekto ‘RoMEo’ daŭrigis la prezentadon de italaj bildrakontoj al esperantistoj.

Antaŭ nelonge aperis eĉ du bildrakontoj, kiuj povas vekti interesiĝon. La unua estas “Lupo Alberto”, kun la bildstrioj de la helblua lupo el la plej fama bestobieno en Italio; kaj la dua, “Lasta leciono en Gotingeno”, rakonto pri la matematikaj nefinioj.

Ĉi-lastata komikso estas senpage elŝutebla en formato PDF el la retejo de la projekto RoMEo danke al la afableco de ĝia aŭtoro, Davide Osenda. La dosiero prezentas la unuan parton de la rakonto “Lasta leciono en Gotingeno”, kiu jam aperis en la itala. Historio, matematiko

kaj filozofio miksiĝas dum vojaĝo al la nefinio, kiu forrabas la fantazon de ĉiuj legantoj.

Por tio ni bezonas trovi antaŭe sufiĉe da eblaj aĉetontoj. Se vi ŝatus tiun ĉi rakonton, kaj dezirus subteni ĝian publikigon, aĉetante unu aŭ pli da paperaj ekzempleroj, bonvolu tion anonci sur la paĝaro de RoMEo, ĉe la projekttestro Daniele Binaghi, [daniele.binaghi@libero.it](mailto:daniele.binaghi@libero.it). La bildrakonto estas senpage elŝutebla ĉe: <http://www.pecorelettriche.it/esperanto/romeo/gotingeno.asp>. (*Ret-Info, Eventoj Hungario*)

**Germanio:** *Herzberg am Harz prosperas* –

La Interkultura Centro Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo – dissendis sian dekan informleteron sub la titolo “Fiera Bilanco 4-a Naskiĝtago Herzberg – la Esperanto-urbo” (Informletero 10). Longa estas la listo de la efektivigitaj kaj efektivigotaj projektoj. Esperanto vere vivas en Herzberg. Ekzemple, tri restoracioj havas menukarton en Esperanto, kaj ekzistas tri Esperanto-pladoj. La agado de la tieaj Esperanto-aktivuloj povus inspiri multajn grupojn kaj asociojn tra la mondo, ankaŭ izolitajn aktivulojn. Ĝia retejo estas nun multlingva: <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=77507155>. Prezento de la urbo en Esperanto: <http://www.herzberg.de/staticsite/staticsitde.php?menuid=313>. La informletero estas ricevebla laŭ simpla peto ĉe [esperanto-zentrum@web.de](mailto:esperanto-zentrum@web.de).

**Belgio:** *EU-leksikono de bicikladoterminoj* – Aperis la dua eldono de ilustrita pasportformata libreto enhavanta ŝlosilterminojn rilate al biciklado, biciklospedoj kaj biciklokonstruo en 27 lingvoj, inkluzive de ĉiuj 23 oficialaj eŭropuniaj lingvoj, statistikoj pri biciklado en Eŭropo, samkiel aspektojn ekonomiajn, sanrilatajn kaj mediprotektajn de biciklado. La dua eldono aperis okaze de la internacia konferenco pri biciklopolitiko “Velo-city Global 2010”.

La eŭropa bicikla leksikono estas utila por ĉiuj, kiuj deziras bicikli en alia eŭropa lando. Ĝi kreskigas konscion pri la multaj avantaĝoj de biciklado kaj la bezono je bona bicikla infrastrukturo inter la civitanoj kaj inter la diversaj publikaj instancoj.

Ĉu vi estas sperta pri tradukado kaj ĉu vi emas kunlabori por eldoni esperantlingvan version? Ekde aŭtuno 2010 prezentiĝas al la esperantistoj la ebleco aldoni terminojn kaj traduki jam ekzistantajn terminojn partoprenante tiucele en kreatoran Viki-kunlaborejon. Jam nun ekzistas presita versio en aliaj kro-



maj lingvoj (la rusa, japana, ĉina, araba), kiuj do ne estas inter la 23 oficialaj EU-lingvoj, kaj en interreta versio ankaŭ jenaj lingvoj estas en fazo de preparo: la kroata, turka, islanda, makedona, montenegra, albana.

Kunlaboro estas bonvena!

Por pliaj informoj: Eŭropa Ekonomia kaj Socia Komitato. Konsultu en aŭtuno ĝian retejon <http://www.eesc.europa.eu/?i=portal.en.home#boxTabl-3> aŭ eventuale demandu pliajn detalojn (en oficiala EU-lingvo) al [Barbara.Gessler@eesc.europa.eu](mailto:Barbara.Gessler@eesc.europa.eu).

(*Herman Deceuninck, BE*)

**Ĉeĥio:** *Nova interreta vikimagazino lanĉita* – Ĉe <http://www.esperanto.cz>, la retpaĝaro de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperis la 3-an de septembro en la *Rubriky Aktuality* (Aktualaĵoj) nova interreta monatreveno nomita Mozaiko. Tiu ĉi netradicia magazino de interesaĵoj estas tempoŝpare bazita plejparte sur ligiloj al artikoloj en la Esperanta Vikipedio.

Ĝia ĉefa celo estas proponi al esperantistoj, kiuj ne bone konas la interretan enciklopedion Vikipedio aŭ ankoraŭ iom dubas pri ĝia valoro kaj utileco, elekton da legindaĵoj el la plej diversaj fakoj, tiel ke laŭeble ĉiu trovu ion interesan por si.

La artikoloj povas esti uzataj ne nur por individua kleriĝado kaj lingva perfektigado, sed ankaŭ kiel fonto por preparo de lingvokursoj por progresintoj aŭ pretigo de prelegoj por E-kunvenoj aŭ aranĝoj.

La iniciatinto de la projekto kaj ĉefredaktorino, Pavla Dvořáková, bonvenigos viajn reagojn kaj proponojn por la enhavo de la sekvantaj numeroj!

(*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)

**Brazilo:** *Granda fajro en Bona Espero* – Ampleksa incendio detruis grandan parton de la teritorio de Bona Espero, la esperantista orfejo en Brazilo. Granda grundofajro trafis la regionon en la tria semajno de septembro, sed ne atingis la ĉefajn konstruaĵojn de Bona Espero.

En letero sendita al subtenantoj de la projekto la esperantistaj estroj de la orfejo, Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, rakontas pri la okazaĵo:

“... Ni saviĝis el grandega fajro, kiu fortege alvenis nokte de la nordo. Se estus dumtage, oni pli sekure povus batali kontraŭ la flamoj, sed nokte ĉiuj bestoj, ĉefe la serpentoj fuĝas rekte al la homoj, kiuj volas kontraŭbatali... Tamen ni sukcesis defendi niajn domojn kaj legomejojn. Ĉe la lago ĉio estas nigra, kaj eĉ brulis la elektraj dratoj kaj kelke da tuboj...”

Dum la nokto la laborantoj kune kun la infanoj provis haltigi la fajron ĉe vojo por savi la konstruaĵojn:

“Ni feliĉe sukcesis, sed 90% de la tuta teritorio de Bona Espero, inkluzive de ĉiuj najbaraj grundoj, brulis, sed la fajro ĝis nun ne haltis. Ĝi nun voras la parkon, kiun oni provas defendi per du malgrandaj aviadiloj, sed ne sukcesas. Ĉio brulas...”

La prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, en mesaĝo sendita al la retpoŝta listo de la UEA-membroj, alvokis ĉiujn laŭeble doni financan subtenon al Bona Espero, por ripari la damaĝon:

“Mi skribas al tiu ĉi listo kun la espero, ke iuj el vi – kiuj jam konas la projekton Bona Espero kaj scias pri ĝia profunda valoro por la bonfarto de Esperanto kiel ideo en la reala mondo kaj pri la ŝvito de sindonaj homoj el la tuta esperantista mondo, konstruinta kaj savtenanta tiun ĉi unikan kunlaborejon – tuj faros financajn aŭ aliajn materiajn kontribuojn, se vi ne jam proponis aŭ sendis ion al Ursula, Giuseppe kaj ilia granda familio.”

*(Ret-Info, Eventoj, Hungario)*

## **Nia rakonto: Aljoŝa Gorŝok (2)**

*(Ons verhaal: Alosja Gorsjok) (2)*

Tiel Aljoŝa pasigis unu jaron kaj duonan, kaj tiam, en la dua parto de la dua jaro, okazis al li la plej eksterordinara afero en lia vivo. Tiu okazaĵo konsistis el tio, ke li, je sia granda miro, konstatis, ke krom la ordinara interrilato inter la homoj, kiu ekestas pro tio, ke oni bezonas unu la alian, ekzistas tute alia, tre speciala maniero interrilati: ne pro la neceso poluri ies



ŝuojn aŭ porti mesaĝojn al iu aŭ jungi ĉevalon –, sed ke oni povas bezoni alian personon pro nenio alia kaŭzo ol por servi ĝin, por karesi ĝin –, kaj li mem, Aljoŝa, estis tia persono.

Tion li eksciis per la servistino Ustinja. Ŝi estis orfino, ŝi estis juna kaj same tia labormaŝino kiel Aljoŝa. Ŝi kompatis Aljoŝan, kaj unuafoje en sia vivo Aljoŝa sentis, ke alia homo bezonas lin mem kaj ne liajn servojn. Kiam lia patrino kompatis lin, tio neniam frapis lin, ĉar ŝajnis al li, ke tio devas esti tiel, ke tio estis la sama kiel kompatis sin mem. Sed nun li subite vidis, ke ankaŭ Ustinja, kompleta fremdulino, kompatis lin, ke ŝi gardis por li iom da kaĉo kaj butero en pelvo, kaj dum li manĝis, ŝi rigardis lin, la mentonon sur la mano, ŝian nudan brakon eliĝintan el la suprenfaldita maniko. Li ĵetis rigardon al ŝi, ŝi ekridis kaj ankaŭ li ekridis.

Tio estis tiel nova kaj fremda, ke komence Aljoŝa ektimis. Li sentis, ke tio malhelpos lin bone fari sian servon, kiel li ĉiam faris ĝin ĝis nun. Sed li tamen ĝojis, kaj kiam li vidis, kiel lia pantalono estis flikita de Ustinja por la tioma fojo, li skuis la kapon ridetante. Ofte kiam li estis laboranta aŭ survoje, li pensis pri Ustinja kaj diris: “Ha, tiu Ustinja!” Ustinja helpis lin, kie ŝi povis, kaj li helpis ŝin. Ŝi rakontis al li pri ŝi mem, kiel ŝi fariĝis orfino, kiel ŝia onklino akceptis sin en sia domo, kiel oni sendis ŝin kiel servistinon en la urbon, kiel la filo de la komercisto amindumis ŝin, kaj kiel ŝi malakceptis liajn proponojn. Ŝi ŝatis babili, kaj Aljoŝa ŝatis aŭskulti ŝin. Li aŭdis, ke ofte oka-zas en la urbo, ke iuj kampuloj inter la laboris-toj edziĝis je servistinoj. Kaj iam ŝi demandis lin, ĉu oni baldaŭ edzigos lin. Li diris, ke li ne scias tion, kaj ke li tute ne ŝatus, ke oni donu al li novedzinon en la vilaĝo.

“Diru do, kiun vi petus?” ŝi demandis.

“Mi elektus vin. Ĉu vi volus edziniĝi je mi?” “Kia lerta respondo. Oni nomas vin Gorŝok, sed tamen vi povas diri ion tian tre lerte,” ŝi ekkriis kaj batis lin sur la dorson per la lavtuko. “Kial do mi edziniĝus je vi?”



La edzino de la komercisto eksciis, ke Aljoŝa intencas edziĝi je Ustinja, kaj tio ne plaĉis al ŝi. “Ŝi eble baldaŭ gravediĝos, kaj al kio ŝi ankoraŭ taŭgos, kiam ŝi havos infanon.” Ŝi rakontis tion al sia edzo

La semajno antaŭ la granda fasto la maljuna patro de Aljoŝa venis al la urbo por ricevi sian monon. La mastro donis ĝin al li.

“Ĉu mia filo fartas bone?” demandis la kampo. “Mi jam diris, ke li estas tre obeema.”

“Kvankam li estas obeema, li elpensis stultajon. Li metis en sian kapon edziĝi je la kuireja servistino. Sed geedziĝintajn homojn mi ne povos gardi. Tion mi ne volas.”

“Li estas tia ŝtupo, tia ŝtupo, sed li tamen metas al si ion en la kapon,” diris la patro. “Sed ne maltrankviliĝu. Mi diros al li, ke li devas eligi tion el sia kapo.”

En la kuirejo la patro sidiĝis ĉe la tablon kaj atendis sian filon. Aljoŝa estis kurinta fari komisiojn. Senspira li alvenis hejme.

“Mi kredis, ke vi estas bona knabo. Sed kion vi nun elpensis?” demandis la patro.

“Mi? Nenion.”

“Kiel – nenion? Vi volas edziĝi. Mi edzigos vin, kiam la tempo venos, kaj mi edzigos vin je iu, kiun mi opinias taŭga kaj ne kun ĉiesulino el la urbo.”

La patro diris multajn aferojn. Aljoŝa restis staranta kaj suspiris. Kiam li patro finis, Aljoŝa ekridetis.

“Nu bone, tio eblas.”

“Tiel estas bone.”

Kiam lia patro foriris kaj li restis sola kun Ustinja, li diris al ŝi (ŝi estis aŭskultinta malantaŭ la pordo):

“Tio ne povas okazi. Ĉu vi aŭdis tion? Li koleris kaj diris, ke li ne permesas tion.”

Ŝi mallaŭte ekploris en sia antaŭtuko

Aljoŝa klakis per la lango.

“Mi ne povas agi alie, mi devas obei. Estas klare, ke ni devas rezignacii.”

Vespere, kiam la komercista edzino vokis lin, por ke li fermu la ŝturojn, ŝi diris al li:

“Kaj ĉu vi obeis al via patro? Ĉu vi forigis tiun stultaĵon el via kapo?”

“Estas klare, mi metis ĝin el mia kapo,” diris Aljoŝa, ekridis kaj samtempe ekploris.

Ekde tiu momento Aljoŝa ne plu parolis pri geedziĝo je Ustinja, kaj li vivis same tiel, kiel antaŭe.

Dum la fasto la butikisto ordonis al li, balai la neĝon de la tegmento. Li grimpis sur la tegmenton, tute purigis ĝin, sed kiem li komencis forigi la frostiĝintan neĝon el la defluiloj, li stumblis kaj falis kun sia ŝovelilo. Malfeliĉe li ne trafis en la neĝo, sed sur la malmola grundo ĉe la elirejo. Ustinja venis el la domo kun la filino de la mastro.

“Ĉu vi vundis vin, Aljoŝa?”

“Tute ne gravas. Ne gravas.”

Li volis ekstari, sed li ne sukcesis, kaj li ekridetis. Oni portis lin en la domon kaj venigis flegiston. Tiu ĉi rigardis lin kaj demandis, kie li sentis doloron.

“Ĉio doloras, sed tio ne gravas. Nur, la mastro koleriĝos. Oni devos sendi mesaĝon al mia patro.”

Tiel Aljoŝa kuŝis du tagojn sur sia lito. La trian tagon oni venigis pastron.

“Kio estas tio, ĉu vi eble mortos?” demandis Ustinja.

“Nu, ne gravas. Ĉu ni do devas ĉiam resti vivaj? Iam oni devas morti,” diris Aljoŝa, malrapide kiel ĉiam. “Dankon, Ustinja, pro tio ke vi kompatis min. Tiel vi vidis, ke estas pli bone, ke oni ne lasis nin geedziĝi, ĉar el tio estus deveninta nenia bona. Nun ĉio estas kiel eble plej bona.”

Kun la ekleziulo li preĝis, sed nur per la manoj kaj la koro. Kaj en lia koro estis tiel, ke, se ĉio estas bona ĉi tie sur la tero, kiam oni



obeas kaj faras nenian malbonon al iu, ankaŭ tie for ĉio estos bona.

Li diris malmulte. Li nur petis trinkaĵon kaj li daŭre miris pri io.

Li miris pri io, etendis sin kaj mortis.

*Leo Tolstoj. Trad. J.P.D.*

## **Kie iam situis Trojo... (fino)**

*(Waar eens Troje lag... (slot))*

D-ro Prof. Iman Jacob Wilkins de la Universitato de Kembriĝo, kiu pristudis ĉiujn fontojn, estas konvinkita, ke la milito de Trojo okazis en Anglio en la regiono inter Londono, Kembriĝo, la golfeto Wash kaj la Norda Maro, kaj ke la aĥajoj loĝis en okcidenta Eŭropo.

Multaj loknomoj en norda Germanio, Nederlando, Belgio, Francio kaj Hispanio verŝajne estas restoj de la nomoj kiujn mencias Homero. La simileco estas ofte tiel granda, ke oni ne rajtas paroli pri hazardo. Jen kelkaj ekzemploj:

(Greka u = germana ŭ; greka ou = esp. u)

Acheron (rivero): antaŭe Agger kaj Hont, nun Honte aŭ Westerschelde)

Kokutos (rivero): Cocyxse Gat, Koksijde

Stux (rivero): Tryx aŭ Stryx (antaŭe antaŭ la belga marbordo)

Fulakè: la insulo Overflakkee

Gouraj: la insulo Goeree

Puthon: la insulo Putten

Scuros: Schuring (loĝloko de Aĥilo)

Iton: Etten



Brad Pitt kiel Aĥilo en la filmo 'Troy' (Trojo).

Boudejon: Boudinkerke, nun Boudewijnskerke  
Hèlion (rivero): Helium en la romia tempo  
Maja (patrino de Hermes): Maye (vilaĝo malaperinta en la maro)

Kerberos (trikapa hundo kiu gardis Hades; en la latina: Cerberus): Serooskerke (sur ĝia blazonŝildo estas tri hundokapoj) kaj Hondegem  
Kampè: Kamperland

Feraja (filino de Eolo, dio de la ventoj kaj mita patro de la eoloj): Veere

Melissa: Melissant

Galatea (prapatrino de la keltoj): Galatea, malaperinta vilaĝo)

Herkunè: Herkingen

Brugoj: Bruĝo

Ios: antaŭe Iosland, nun St.-Joosland

Thessalia: la insulo Texel (pron. Tesel)

Delfoj: Delft

Thèbaj: Dieppe

Egypte: Epte (rivereto en norda Francio)

Sparta: Esparta (urbeto en Hispanio)

La angloj havas tre malnovan tradicion rilate al Trojo. La libro, en kiu ĝi estas priskribita, certe kopio de pli malnova, datiĝas nur el la IX-a jarcento, sed certaj detaloj en ĝi pravas, ke la historio havas veran bazon.

Pri kio temas? La trojano Eneo (Ajneas) sukcesis fuĝi el la brulanta Trojo. Fine li trafis en Italio, kie li edziĝis je Lavinia, la filinon de reĝo Latinus. Tiel li fariĝis laŭtradicie la prapatro de la romanoj. Lia pranepo Bruto mortigis sian patrinon naskiĝante kaj senintence sian patron dum ĉaso. Tial li estis ekzilita el la lando kaj reiris kun kelkaj kompanoj al la lando de siaj prapatroj, Troado, la nuna Anglio. Li estis bone akceptita, rekonita kiel posteulo de la trojaj reĝoj kaj farita reĝo de la lando. Li konstruis novan ĉefurbon ĉe la rivero Temzo, kiun la keltaj loĝantoj nomis Caer Troja, t.e. en la latina Nova Troja, kaj kiu nuntempe nomiĝas Londono. Liaj regatoj poste nomis sin Britoj, laŭ la nomo de ilia reĝo Brutus.

Ankoraŭ en la moderna tempo la angloj gardas memoron pri Trojo. Laŭ la tradicio ĉiuj reĝoj de Britio devenas de la reĝoj de Trojo. Laŭ dokumentoj el al XVII-a jarcento oni salutis reĝinon Elisabeta I per la vortoj "aminda posteulino de la reĝeco de Priamo, espero de la reviviĝinta Trojo".

Jam delonge la sciencistoj akordas pri tio, ke ĉirkaŭ 60 km norden de Londono en la ĉirkaŭaĵo de Kembriĝo sur la ebenaĵo antaŭ la golfeto Wash okazis grava milito en la Bronza Epoko.

En tiu ebenaĵo oni trovis ekde 1844 preskaŭ 7.000 pecojn de bronzaj armiloj kaj armaĵoj: glavoj, aksoj, pugnokojnoj, tranĉiloj, ponardoj, lancpintoj sagopintoj, armaĵaj ornamaĵoj kaj kaskoj.

Sed oni trovis tie ankaŭ la fundamentojn de granda antikva urbo, rondan teran remparon kiu havas diametron de 70 metroj, multajn pecojn de potoj, multajn skeletojn de ĉevaloj restaĵojn – ne de homoj –, de malgrandaj ŝipoj ktp. Tial oni nomis tiun terenon ‘la paradizo de la kamparĥeologio’.

Pluraj sciencistoj konfirmas la ekziston de bone strukturita socio kun bone disvolvita agrikulturo en Anglio dum la Bronza Epoko. Oni taksas la nombro de la tiutempa loĝantaro je tri milionoj.

La toponomio de tiu ĉi ebenaĵo perfekte kongruas kun la priskriboj de la ebenaĵo de Trojo donita far Homero. Ĉio estas tie. Multajn homerajn loknomojn oni povas ankoraŭ nun rekoni en nunaj loknomoj. Kelkaj ekzemploj: (*La unua nomo estas la homera, la dua la angla*)

#### Riveroj:

Rhesos: Rhee

Heptaporos: Hiz kaj Ivel (kun sep travadejoj).

Karesos: Cardyke (en Mezepoko: Caresdic).

Rhodos: Roding

Granikos: Granta

Ajsopos: Ise

Skamander: Cam

Axios: Axe aŭ Exe en Devonshire.

Chryse: Cray kaj Crayford.

Temese: Theems (Tamesis por la romianoj).

#### Loknomoj:

Lekston: Lexden

Cilla: Chilham

Tenedos: Thanet (Tanatus por la romianoj).

Thebe: Theberton (ton = urbo)

Fine restas ankoraŭ la demando, kio kaŭzis la militon de Trojo.

Jam en la V-a jarcento a.K. la malnovgreka historiisto Herodoto skribis en siaj ‘Historioj’: ”Se Helena estus estinta en Trojo, ŝi certe estus redonita al sia edzo kun aŭ sen la aprobo de Pariso, ĉar mi ne povas kredi, ke reĝo Priamo estus estinta tiel stulta riski sian propran vivon kaj tiujn de siaj infanoj kaj regatoj nur por permesi al Pariso vivi kun Helena”.

Ekde Herodoto neniu kredas, ke aĥajoj kaj trojanoj batalis tiel grandan militon kaj oferis tiom da homvivoj pro la belaj okuloj de virino.

Ankaŭ la tezo, ke Trojo gardis Bosporon por malhelpi la aĥajojn eniri la Nigran Maron ne

havas sencon, ĉar la monteto Hisarliko troviĝas tro for de Bosporo por konsistigi minacon.

La kaŭzo certe estas ekonomia.

Troado-Anglio estis la plej grava produktanta de de stano. Tiun metalon oni bezonis por fari bronzon, alojon de stano kaj kupro. Tiu-tempe ĝi estis malofta kaj multekosta. Eble la aĥajoj deziris ekposedi la altvaloran metalon kaj pro tio detruis la potencan urbon Trojo.

*Pieter Jan Doumen*

#### Bibliografio:

«Waar eens Troje lag», Prof. Iman Jacob Wilkins, Bosch en Keuning

«Toen Herakles spitte en Kirke spon,» Hubert Lampo, Ontwikkeling, Antwerpen

«Prismawoordenboek der Klassieke Oudheid», Prismaboeken, Antwerpen



### **Limburga Esperanto-Asocio**

*(Limburgse Esperantovereniging)*

#### **Aktivaĵoj en septembro kaj oktobro 2010 :**

Ĵaŭdon, la 30-an de septembro: Malgraŭ niaj klopodoj konatigi al la publiko en kaj ĉirkaŭ Peer nian intencon aranĝi informvesperon pri Esperanto la 30.09, venis nur unu interesata persono ... kiu ankaŭ ne venis al la unua kurs-vespero. Tial, bedaŭrinde, ne okazas kurso por komencantoj. Sed plu daŭrigas samtempe kaj samloke la kurso por progresintoj. Ni invitas ĉiujn personojn kiuj iam sekvis kurson por komencantoj **senpage sekvi tiun ĉi kurson!**  
Ĵaŭdon, la 28-an de oktobro: Ben Indestege, kiu trakuras la mondon per Pasporta Servo, rakontis pri sia vojaĝo tra Afriko.

#### **Aktivaĵoj en novembro kaj decembro 2010:**

Ĵaŭdon, la 25-an de novembro: Henri Schutters prelegos pri Pieter Brueghel la Maljuna.

Ĵaŭdon, la 16-an de decembro: Festa supeo memore al D-ro L.L. Zamenhof, kiu naskiĝis precize antaŭ 151 jaroj kaj 1 tago. Detaloj pri la tempo, loko kaj prezo de la supeo estos donitaj fine de novembro. Ĉiuj membroj de LEA estas tutkore invitataj partopreni !